

KATOLLIKA SENTO

3



U.E.C.I. ANNO 51°

12 rm

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 51° - 1972

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

51a jaro

n° 3

Marto 1972


GRAVA KAJ ĜOJIGA SCIIGO por ĉiuj katolikaj esperantistoj: sekve de la propono kaj interesiĝo de p. Karlo Cecchitelli, tiam loĝanta en Jerusalemo, oni ĵus interkonsentis kun P. Alfonso Calabrese ofm. de la Milana Komissariato por la Sankta Lando, pri mozaika reprodukto en Nazareto de Nia Sinjorino de la Espero, pentrita de p. Arcangelo Intreccialagli. Niaj katolikaj esperantistoj bone konas ĝian bildon, pri kio oni dissendis inter ili dek mil bildkartojn. Laŭ la informoj donitaj de Ark. Muzio, kiu prozorgos la prilatan artverkon en la monumenta baziliko de la Anunziacio en Nazareto, la panelo, kiu mezuros m. 1,05 per m. 2, kostos inter 400.000 kaj 500 mil italajn lirojn. Ŝajnas al ni, ke tiu sumo ne estas tro multekosta kompare kun la grandeco de la bildo kaj precipe pro la ŝanco de ĝia starigo en la mondfama baziliko. Ni volonte transdonas ĉi tien la mesaĝon de P. Albino Ciccanti, ofm. prezidanto de nia U.E.C.I.:

MOZAIKA PANELO EN NAZARETO honore al nia Sinjorino de la Espero.

Alvoko al ĉiuj Esperantistoj.

Notinte la sukceson de la paneloj "Pater" kaj "Magnificat" en esperanto jam de kelkaj jaroj en Jerusalemo kaj en Ain Karem, la itala katolika unuiĝo esperantista (UECI) decidis lokigi en Nazareto ĉe la nova mirinda baziliko dediĉita al la mistero de la Anunziacio, mozaikan panelon honore al nia Sinjorino de la Espero, protektantino de la Esperantistoj. Konsiderinte, ke mi

loj da turistoj, kristanaj kaj ne, el la tuta mondo ĉiujare vizitas la bazilikon, oni invitas ĉiujn esperantis-



tojn malavare kontribui al ĉi tiu altvalora iniciato. La landaj reprezentantoj de IKUE estas varme petataj diskonigi la iniciaton kaj sendi la kolektitan monon al la kasisto de UECI: D.ro C.C.Ferrari; (poŝtĝirkonto - 3/7791); aŭ al: P.Giacinto Jacobitti; (C.C.P. 1/37638) Kiu preferas kontribui per Mes-intencoj, bv. sin turni al katolika pastro, kiu tamen nepre devas informi pri tio p.on G.Jacobitti. Nia roma katolika grupo (CECR) kiel unua jam donis tiu cele £ 40.000; s.ino Dell'Aringa £ 10.000. P. Jacobitti £ 10.000; ges-anoj Minnaja £ 20.000. Por kuraĝigi similajn larĝajn monoferojn ni decidis, ke ni donacos al ĉiu, kiu sendos al ni almenaŭ 10.000 lirojn, la

bildkarton de nia Sinjorino de la Espero: valorega memoraĵo benita de la Papo en S. Petro, okaze de la solena inaŭguro de la bildo, kun vatikana poŝtmarko kaj poŝta stampo de la sama neforgesebla tago.

TAGIĜO DE LA ESPERANTA POEZIO

Kiam, en 1887-a, D-ro Zamenhof eldonis la unuan libron pri la "Lingvo Internacia", li prave konsideris, ke tiu kajero estas la embrio de lingvo, kiu poste, pere de la uzantoj, evoluos kaj akiros ĉiam pli ampleksan kaj artan formon kun aparta propra spirito. Pro tio en la maldikan kajeron li enmetis ankaŭ tri poemetojn, por pruvi, ke ne temas pri iu speciala ĉifro, sed pri kompleta lingvo taŭga por ĉiuj uzoj kaj tiel ankaŭ por poezio. Cetere, Zamenhof, havante poetan delikatan animon, ĉiam pensis pri kompleta lingvo, kaj sekve, en la forĝado de la diversaj projektoj, li eksperimentis kaj ekzerciĝadis originale kaj traduke ne nur proze sed ankaŭ verse. Pri tiu laboro al ni restas kelkaj fragmentoj, kiuj atestas la penadon de la aŭtoro por atingi kaj prezenti ion organike perfektan. La tri poemoj entenataj en la unua libro estas: unu tradukita el germana lingvo ("En sonĝo princi - non mi vidis", de Heine) kaj du originalaj: "Mia penso" (jam parte verkita en 1882-a en antaŭa formo de Esperanto) kaj "Ho mia kor'", plene pensita kaj verkita en la nova lingvo. La historian valoron de ĉi-lasta donas ne nur la fakto, ke ĝi estas la unua tute originala poemeto en Esperanto, sed ankaŭ la cirkonstanco, ke ĝi priskribas la tumultantan animstaton de la aŭtoro ĉe la ekpaŝo de la lingvo. Do, nia Majstro estis ankaŭ la unua poeto en sia lingvo. De li jen la tria originala poemo, titolita "Al la Esperantisto"; kiu

aperis en la unua numero de la unua Esperanta gazeto "La Esperantisto", en septembro 1889-a. Verŝajne la aŭtoro, kiu verkis ĝin en momento de entuziasmo pro la grava okazaĵo, poste ne plu ŝatis ĝin, kaj ne enmetis ĝin en la antologion "Fundamenta Krestomatio". Nun la poemeto kuŝas preskaŭ forgesita en la "Originala Verkaro". Pro ĝia historia intereso, tamen meritas ĝin koni.

Al la Esperantisto

En bona hor'! Ni aŭdis la signalon
Kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
Sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,
Salutas vin, ho nia luma stelo!
Konduku nin, senhalte kaj sentime,
Al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estas nia vojo,
Kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;
Sed batalante, kun plej granda ĝojo
Senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l' komenco,
L' unua muro estas trarompita,
Kaj dolĉa estas nia rekompenco,
Kiam la celo estos alvenita.

La literatura karaktero de la nova lingvo trovis tuj siajn adeptojn jam en la jaro de sia prezentiĝo.

Unua inter la unuaj estis la frato mem de la aŭtoro, Felikso, gaja, vivoplena, amuziĝema, bonhumora junulo 19-jara, kiu, kelkajn tagojn post la apero de la libreto, prezentis al la frato sian unuan versaĵon kaj

ricevis la esperantistan bapton.

Al Felikso sekvis la 22-jara studento kaj jam konata poeto en pola lingvo, Leo Belmont (pseŭdonimo de Leono Blumental), kiu, tuj entuziasmigita de la nova idiomo, skribis al la aŭtoro la profetan frazon "Vi venkos, Sinjoro, vi venkos!". Li fariĝis poste fama advokato, elokventa oratoro kaj tre legata verkisto, kaj al Esperanto donis belsonajn kaj delikatajn versojn.

Tria en la vico, kaj la plej grava, estis la 30-jara pola inĝeniero kaj poligloto Antono Grabowski, ravita de la simpleco, de la logikeco kaj de la natureco de la nova lingvo. Je la komenco de la jaro 1888-a li vizitis la Majstron, surprizante lin per flua Esperanto-alparolo, kio reprezentis la unuan konversacion en la Internacia Lingvo. Je lirika animo, per siaj ĉarmaj multnombraj poemoj, li prave meritis la titolon "Patro de la Esperanta poezio".

La kvaran lokon oni devas atribui al la litova katolika pastro Aleksandro Dombrowski, kiu verkis plurajn poeziaĵojn, inter kiuj unu longan en februaro 1893-a. Ĝi estas dediĉita al Papo Leono XIII, okaze de lia kvindekjara episkopa jubileo, kaj aperis en la unua Esperantlingva Preĝareto kune kun la franca traduko.

Al la supraj poetoj, lernintaj la lingvon en la jaro 1887-a, aldoniĝis je la fino de 1889-a la 17-jara bohema junulo Francisko Valdimiro Lorenz, "talenta poeto kaj granda promeso por la naskiĝanta Esperanta literaturo" kiel skribis en tiu tempo Zamenhof mem. Kaj fakte Lorenz ne dementis la promeson.

En 1891-a envenis en la vicojn de la kulturantoj de la Muzoj la 29-jara rusa literaturisto Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin, kiu kun rimarkinda poeta genio donis ampleksan alporton; interalie li verkis la unuan originalan rakonton en Esperanto "La nevola morti -

ginto", en versoj.

En la jaro 1892-a debutis en la poezio la unua itala esperantisto (jam aŭtoro de lernolibro por italoj) d-ro pri juro Daniele Marignoni, per la traduko de du mallongaj versaĵoj: "Preĝo" de Giuseppe Giusti, kaj "La riĉo ankoraŭ ne feliĉo" de A. Paravia. Jen la

Preĝo

Al la animo premata
De dubo, timo, doloro,
Venu por helpo, Sinjoro,
Kun de la kredo radi'.

Liberigu ĝin de l' pezo,
Kiu en marĉon ĝin tiras;
Al vi mi plendas, sopiras,
Min rekomendas al Vi!

Vi scias, ke vivo mia
Iom post iom foriĝas;
Kiel ĉe l' fajr' fluidiĝas,
Vakso, kaj neĝo en sun'.

Al la animo volanta
Ĉirkaŭi Vin per brakpreno,
Per Vi rompiĝu la ĉeno,
Kiu ĝin tenas ĝis nun.

Ĉiuj el la antaŭe menciitaj meritas tute specialan kaj iom detalan priparolon, ĉar, estante, kune kun la Majstro kaj sub lia modela gvido, la unuaj praktikan-toj kaj tial la vartantoj de la lingvo, ili donis al ĝi spiriton kaj vivantecon, kaj al ĝia poezio la unuajn flugilojn.

Kaj pluraj aliaj poetoj - inter ili De Wahl, Gold - berg, Lojko, Satunowski kaj Naumann - donis pli -

malpli efektivan kontribuon al ĉi tiu formiĝa periodo.

En la jaro 1893-a aperis la unua poemaro en nia lingvo: "La liro de la Esperantistoj", cent dek poezi aĵoj originalaj kaj tradukitaj, kolektitaj de Antono Gra^ubowski. Sub blua kovrilo, sur kiu birdetoj inter flo^uroj simbolas la kanton de la versoj entenataj en la li^ubro, ĉi tiu kolekto signas la unuan etapon de la Inter^unacia Lingvo, kaj povas esti konsiderata la luma taĝi^uĝo de la Esperanta poezio.

Luigi Minnaja

.....

ROMA ESPERANTA VOĈO

n^o 103

.....

ORA ESPERANTISTA JUBILEO. - Nia samideanino Carolina Minnaja festas nunjare la oran jubileon de sia esperantistiĝo. Ŝi venis al Esperanto sekve de parola do farita de Admiralo Alberto Alessio en Venecio, la vesperon de la 5-a de januaro 1922-a. Ŝi estis altirit^ua ne nur de la simpleco de la lingvo, sed ankaŭ de ĝia interfratiga celo, de tiu "Nova Sento", esprimita en la himno "La Espero". Kun juna entuziasmo (ŝi estis tiam 18-jara) ŝi lernis profunde la novan idiomon, tuj eniris aktive en la movadon kaj baldaŭ fariĝis fervora apostolo de la granda ideo, propagandante kaj instru^uante la lingvon kaj kunlaborante en publikaĵoj kaj re^uvuoj.

Post dekjara seninterrompa agado, eniris ŝian vivon escepta okazaĵo, kiu tenis ŝin por ĉiam nedisi^ugeble ligita al Esperanto: la 17-an de junio 1933-a je tagmezo ŝi renkontiĝis en Placo Sankta Marko kun sa-

mideano Luigi Minnaja, kiu estis irinta el Romo al Venecio por turisma vizito. En 1935-a la cirkonstancoj partoprenigis ilin ambaŭ en komuna agado por la preparo de la 27-a Universala Kongreso: unue por la traduko de la Gvidlibro pri Romo de la Itala Turisma Klubo, kaj poste por la intensa streĉa laboro en la ĉefurbo dum la kongresaj tagoj. Tiu komuna strebado igis pli kaj pli intimaj la sentojn de la du gesamideanoj, sentojn, kiuj poste kondukis al la geedziĝo, okazinta la 21-an de aprilo 1937-a, sekve de kio ŝi fariĝis la valora kunlaborantino de la edzo. La familiaj zorgoj ne haltigis ŝian aktivecon por Esperanto, al kiu baldaŭ komencis doni sian kontribuon la du filoj, Nicola kaj Carlo, kiuj de la patrino lernis Esperanton jam de la naskiĝo.

Por la nunjara evento, samideano Minnaja, laŭ la sulko de la rememoroj, kun delikata amema penso turnigas al sia edzino per la jenaj versoj :

ORA ESPERANTISTA JUBILEO

Al mia edzino

Ho Carolina, jam duonjarcento

paradis kun en kor' la "Nova Sento"!

Vesperis vintre: plaŭdas la laguno,

tremete lirlas l' akvo ĉe l' kanalo.

En la fervoro de l' floranta juno

parolo kaptis vin pri l' idealo.

Konstanta sonĝo de la hom-aspiro:

per unu lingvo ĉiuj sin kompreni,

sin ami reciproke; hom-deziro:

facile, simple lerni, sen tro peni.

Tagmeze: gajas Placo Sankta Marko

sub la brilanta suno mezjunia;

Amor' pretiĝis kun streĉita l' arko

de post unua renkontiĝo nia.

Triumfas brile la kongres' en Romo,
 kaj kontribuis la premanta peno,
 kiu kunligis strikte, sen resono,
 du samcelantajn korojn per kateno.

Edzino kaj patrino saĝmodela,
 l' esperan lingvon vi al la infanoj
 instruis kun l' itala paralela,
 kaj de vi lernis multe da profanoj.

Dotita je persisto kaj konscio,
 gigante vi laboris kaj senlace,
 en ĉiuj kampoj, ankaŭ ĉe l' radio,
 kun febra lert-elano kaj tenace.

Velkadis jaroj dum senhalta kuro,
 vi restis firme ĉe la sama loko,
 la harojn grade pudris la naturo;
 modernaj tempoj venis: novepoko!

Ho Carolina, jam duonjarcento
 forpasis kun en kor' la "Nova Sento"!

Romo, 21-2-1972

Luigi Minnaja

LA "SEMAJNO DE AMIKECO" estis malfermita en nia kunvenejo la 20-an de februaro per la himnoj de la esperantistoj kaj de la Amikeco kaj per disdono de taŭgaj bildkartoj kun poeziaĵo porokaze verkita de s - ano L. Minnaja. El tiuj bildkartoj oni forsendis preskaŭ 500 al konatoj kaj nekonatoj enlandaj kaj eksterlandaj. Por la ĝojo de tiuj, kiuj ne povis ricevi tiun bildkarton, ni aldonas ĉi tie la tekston:

SALUTON, HOMOFRATO!

Plezuro de la vivo firme restas
 l'amemaj vibroj de batanta koro;
 de sin' al sino vera ĝuo festas:
 en l' amikeco sidas ja trezoro.

Reflektas ĝi la lumon de l' animo
 tra la ridetaj briloj de l' okulo,
 bruladas ĉe l' profunda psik-intimo,
 esprimas voĉon de l' homarpostulo.

Kunliga simpatio reciproka
 forigas l' interhoman misan konon.
 Aŭskultu l' eĥon de l' parolo voka,
 akceptu de kunsento la proponon.

Amiko aŭ ankoraŭ nekonato,
 mi vin salutas, kara homofrato !

Romo: 18-an-2-'72

Luigi Minnaja

LA HORO DE LA DIMANĈA MESO por la katolikaj es
 perantistoj en la Baziliko S. Maria la Granda ekde
 Marto estos denove kaj stabile je la 10,30 h., kaj ĝin
 sekvos la kunveno ĉe la Papa Instituto por Orientaj Stu
 doj, en la sama placo "S. Maria Maggiore", n° 7a.

LA UNUA PARTO DE la ĉijaraj festaj mestekstoj es
 tis jam sendita al ĉiuj petintoj. Dum la tekstoj de la
 du antaŭaj jaroj entenis nur la legaĵojn de la tiama ku
ranta ciklo, kaj dum ili povis taŭgi nur por tiu liturgia
 jaro, la nuna serio entenas la legaĵojn de la tri cik-

loj , nomataj A,B,C, tio estas ĉiujn esperantajn tekstojn necesajn por ĉiu jaro. Pro tio kvankam la nuna eldono ne estas ankoraŭ la oficiale aprobita, kio okazos nur post la kompletigo de la tuta kolekto, ĉi tiuj tekstoj estas pretigitaj kun eksterordinara zorgemo. Ĉiu meso okupas meznombre ok-dek paĝojn, kaj la tuto (preskaŭ okdek mesoj) laŭ la aktuala formo an taŭvidas almenaŭ tri aŭ kvar volumojn. Ĉi tiuj mesoj povas esti uzataj - kiel jam okazas multloke - ĝis aperos la presita fest-mesalo; kio ne estos verŝajne pro teknikaj kaŭzoj tro baldaŭa afero. Tiuj, kiuj jam ricevis la pasintjarajn kolektojn nun havas en la nuna formo ion, kio kompletigas kaj anstataŭas ilin. La kosto de la tuto estas tri mil lirojn (sacerdotoj povos celebri intence de P.Jacobitti 3 mesojn).

KORTUŜAJ VORTOJ venis al ni el Ĉeĥoslovakio, ĝojantaj pro la rekonduko de la organo de IKUE, Espero Katolika, al pli inda aspekto kaj ĉefe al sia nobla tasko, kunigi ĉiujn katolikajn esperantistojn ĉirkaŭ la sankta Petra katedro, de Kristo starigita sakramento de kristana unueco. Oni informis nin pri ĝojaj kaj malĝojaj eventoj en la sekcio de la ĉeĥa Esperanto-Asocio. Malĝojaj estis la forpaso de sac. Jan Filip (pri kio ni jam parolis en la februara numero), kaj de d.ro František Svabenik. Ĝojaj sciigoj la fideleco kaj aktiveco de la esperantista agado en la sekcio. Ni bone konas la koron de niaj karaj ĉeĥaj amikoj. Pro tio ni decidis ĉijare konsideri kiel niajn membrojn ĉiujn, al kiuj ni ĝis nun sendis nian K. Son kvankam ĉimomente ni ne sendas ĝin.

ALIĜIS AL UECI-CECR: Roma: G.Amodio; G.Guidi; F.Messina; V.De Benedetto; M.Macri; V.di Tocco Bolonjo: G.Balestrazzi; Cesenato: (FO)T. Girotti;

Collegno(TO): F. Pennacchietti; Milano: E. Grupo ;
Mondoví(CU): C. Battaglia; Napolo: H. Mingo; Ozieri
(SS): A. Angeletti; Treviso: S. Boschin; Centro Stud.
Catt.; Vicenza: G. Franzina; G. E. Vicentino; Aŭs-
trujo: A. Daxberger; Britujo: J. Brady; Ĉeĥoslovakio:
 J. Babinec; A. Berka; J. Bombara; J. Boril; B. Buliko-
 vá; Burnan; G. Chalupová; J. Chvosta; Cihak; A. Hy-
 za; J. Hlavaty; G. Vladimir ; A. Vrabel; J. Hermach; Q
 Horakova; F. Jindra; F. Simonovic; J. Skoumal; F. Sk-
 rla; O. Suchanková; B. Suchanek; J. Tandara; V. Ki-
 balcic; C. Kotizová; J. Kovalcic; Z. Kralová; M. Maj-
 tan; Z. Marešová; V. Mitrovsky; V. J. Morava; M. Mra-
 zová; B. Pecka; J. Pistora; M. Podseniková; F. Pros-
 trednik; R. Siepl; J. Vecere; Weisser; J. Karhan; K.
 Moravciková; M. B. Vancová; Lukes. Francujo: M.
 Pierry; Franca Ligo de Katol. E.; Hispanujo: A. Jime-
 nez; F. de la Puente; Hungarujo; K. Skultety; L. Ko-
 bor; P. Katona; A. Kiss; I. Vago; M. Vadász; Koreo:
 Jeong-Jong-Hiu; Kubo; J. A. Martinez; Novzelando: J.
 Hamvay; Pollando: A. Chomik; Sobiech; T. Kuczkie-
 wic ; W. Majewski; H. Massalska; S. Pietrzak; Suo-
mio(Finnlando): A. Kurikka; U.S.S.R.: Z. Korn;
 Ēntute: 340.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS aliĝi, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribitan de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti senpagan sendadon.

El la Katolika Eklezio:

PRI LA KONSEKRO de 19 episkopoj, kiujn ni jam anoncis en la februara numero, ni volas en ĉi tiu numero doni kelkajn detalojn, certe interesajn al nia legantaro. Asistite de kard. Alfrink, (speciale invitita, okaze de la rito en kiu estos unktitanederlanda episkopo), la 13an de februaro, dimanĉe, antaŭ grand nombra fidelularo, la papo komencis la solenan ordigon. La novaj episkopoj estas la italaj Pecoraj (nova nuncio en Malto), Casoria (Sekret. de la Kongr; por la disciplino de la sakramentoj, Bugnini (sekr. de la Kongr. por la dia kulto; ĉe la unua vico en la foto), kaj Pagani, nova ep. de Città di Castello kaj de Gubbio. Krome, la kolombiaj Lotero kaj Ruiseco; la hindaj Arulappa kaj Pawathil; la usonaj Heston kaj O'Meara; la argentina Collino; la brazila Krevey, la filipina Limon, la franca Brand, la germana Mayer, la irlanda Ryan, la tonga Finaù, la nederlanda Gijzen kaj la rumana Jakab. Post la latina homilio la papo unktis per la sankta krismo la kapon de ĉiu ordinato, donante al ili la episkopajn insignojn. La novaj elektitoj ricevis la brakumadon de la 27 ĉeestantaj kardinaloj kaj de ĉirkaŭ cent episkopoj. Ĉeestis ankaŭ delegacio de la ekumena ortodoksa Moskva patriarkejo. Post la sugestia procesio en la baziliko, de la novaj episkopoj benantaj, la papo malsupreniris kun ili en la kripton, ĉe la tombo de Petro, la unua inter la apostoloj. Tiam oni perceptis preskaŭ senteble la kontinuecon de la eklezio per la apostola viciĝo sen-



interrompe daŭrigita ekde Kristo, kiu investis Petron supera ĉefo de la apostola kolegio, ĝis la 262^a posteulo, Paŭlo VI.

KARD. EŬGENO TISSERANT mortis la 21an de februaro preskaŭ 88-jara. Li naskiĝis en Nancy (Francujo) kaj komencis siajn porpastrajn studojn unue en tiu sama urbo, poste en Jerusalemo, kie montriĝis lia inklino al la antikvaj orientaj lingvoj, hebrea, siria, araba, etiopia, asira, pri kiuj post kelkaj jaroj diplomigis en Parizo. Kun ĉi tiu preparo, elstara vokiĝo de Dio, dudektri-jara li estis vokita al Romo por reordigi la orientlingvajn manuskriptojn de la Vatikana biblioteko, kaj ekde tiu tempo, do dum pli ol sesdek jaroj li en Romo servis al la eklezio, kun la nura interrompo de la unua mondmilito. Sed ankaŭ dum tiu tem-

po kiel oficiro de la franca armeo en Palestino kaj en Sirio li perfektigis siajn lingvajn studojn. En la 1936a li estis "kreita" kardinalo, kaj komisiita kiel sekretario de la Kongregacio por la orientaj eklezioj. Fakte li bone konis krom la orientaj antikvaj lingvoj ankaŭ diversajn el la modernaj; interalie la rusan, grekan, bulgaran, rumanan, ktp. En la ekumena kampo li estis pioniro. Kiam en la 1959a li petis de Johano XXIII, ke oni malŝarĝu lin pri la tasko de sekretario por la orientaj eklezioj, miloj da leteroj alvenis al li el oriento, dankante pro liaj streboj por pli bona interkompreno de la kristanoj.

AKCEPTANTE LA ROMAN komunuman administrantaron je la 27a de januaro, la papo esprimis siajn zorgojn pri la "Urbo" kies episkopo li estas. "La klopodoj por la morala, civila, socia leviĝo de Romo, estas lia sopiro, kiel ankaŭ la celo, diris la papo, de la streboj de la romaj administrantoj." Same la urĝaj problemoj de urbanismo, kiun li pritraktis ankaŭ en sia apostola letero "Octogesima adveniens"; la spirita vivo de tiu granda urbo, kiu signifas eblecon de la religia esprimo de la popolo; kaj ĝia morala aspekto, kiu devas esti elstara karaktero de Romo, centro de la eklezio, gardisto de la plej sanktaj memoraĵoj de la kulto, renkontiĝa celo de pilgrimoj, kiuj iras al ĝi kun spirita sento. La ne malproksima evento - daŭrigis la papo - de la Sankta jaro, la 1975a, metas ĉi tiun problemon unuarange en la konsciencon kaj en la memoron de ĉiuj respondeculoj".

KIAM IU MOVADO POVAS ESTI oficiale agnoskata kiel katolika internacia instituto? Al ĉi tiu demando respondas direktivaro prilaborita de "Consilium de laicis", publikita en la lasta numero de "Acta Apos-

tolicae Sedis", aperinta la 28-an de februaro. En la dokumento oni mencias la esencajn notojn de diversaj internaciaj katolikaj organizoj, kiuj jam funkcias kaj kiuj estis kiel eksperimento por trovi la plej bonan solvon. Kaj, detale ekzamenante la tri terminojn "Internacia katolika instituto", la dokumento reliefigas ĉiujn karakterojn postulitajn por la akiro de la eklezia oficiala agnosko. Aparte ĝi insistas pri la katolika sento, tio estas evangelia spirito, fideleco alla eklezia doktrino, animzorga celo, edukado al kredo de ĝiaj membroj, malfermita spirito laŭ la Dua Vatikana Koncilo. Ĉio ĉi tio estos la postuloj de la eklezio por sia oficiala agnosko, kiu esprimiĝas sub diversaj formoj: per aprobo de la statutoj; per konsento en kandidatecoj por estrado de la instituto; per elekto de kapelanoj aŭ ekleziaj asistantoj.

LA OFICIALA TRADUKO de la Biblio en la italan lingvon, decidita de CEI (Itala episkopa konferenco) estas jam preta post ses jaroj da intensa laboro. Ĝi aperos je la ĉijara pasko en du volumoj. En la unua (1960 paĝ.) troviĝos la pura teksto, zorgita de komisioj de bibliistoj, lingvistoj kaj muzikistoj; en la dua, laŭ la normoj de la kanona jaro kaj de la koncilia Konstitucio, troviĝos komentariaj notoj. Kard. Florit, kiu nome de la episkopa biblia komitato prezidis la gravan entreprenon, rimarkas, ke ĉi tiu teksto devas esti konsiderata "tipa" por la liturgia uzado. La itala episkoparo, transdonante ĝin al la filoj de la eklezio, memorigas, ke ili zorgis por la plej inda prezentado de tiu verko, ĉar pere de la dia vorto Jesuo mem estas inter ni.

PROJEKTO DE EKUMENAJ studoj por la dialogo kun hebreoj estis prilaborita en kunveno de kvardek reli

ĝiulinoj apartenantaj al la Ordeno de "Nia Sinjorino de Ciono". La laboroj daŭris dek tagojn, sub direkto de la ĝenerala superulino, fratino Lariĉa. La plano, kiu antaŭvidas teologiajn sondaĵojn, estos proponata al teologoj kaj spertuloj interesitaj al ĉi tiu temo. La asembleo decidis ankaŭ doni novan energian impulson al la bulteno de la asocio "SIDIC" (Internacia porinforma servo hebrea-kristana). La ordeno de Nia Sinjorino de Ciono estis fondita en la 1842a de du Strasburgaj hebreoj, la fratoj Ratisbonne, kiuj konvertiĝis al katolikismo kaj fariĝis sacerdotoj. La ordeno havas nun ĉirkaŭ du mil religiulinojn, en la tuta mondo. Multaj el ili sin dediĉas al instruado en lernejoj, sed la plej granda parto al la rilatoj inter hebreoj kaj kristanoj. Zorge de tiu ordeno en dek du nacioj estis starigitaj centroj de "hebreo-kristana amikeco" en la ekumena kampo.

LA PAPA KOMISIONO por migrado kaj turismo kunigis en Romo siajn membrojn, nome la naciajn direktorojn, la misiistojn kaj la sociajn asistantojn por elmigrantoj, kaj episkopojn de Belgujo, Francujo, Irlando, Italujo, Jugoslavio kaj Pollando. Tiu asistado - deklaris mons. Clarizio - estas unu el la plej humanaj misioj de la eklezio favore al malriĉuloj kaj al tiuj, kiuj estas nomataj "kvara mondo", ĉar, malproksimaj de sia patrujo, ili troviĝas izolitaj en fremda lando. Nuntempe Eŭropo por la subevoluintaj landoj fariĝis la preferata celo de tiu elmigrado, kiu en la pasinteco sin direktadis al aliaj kontinentoj. Fakte estas unu miliono kaj duono la elmigrintoj interne de Eŭropo, dum estas nur 750.000 tiuj, kiuj celas aliajn kontinentojn. Granda parto de ĉi tiuj mizeraj rifugiintoj kaj vagantoj travivas veran tragedion, ĉar ili perdis kun sia lando ĉian defendorajton, ĉian socian

pozicion, kelkfoje ankaŭ la kredon. En la 1947a la rifuĝintoj estis unu miliono kaj 700 mil; nun ili superas dek milionojn, dum ankoraŭ ne estas difinitaj inter la nacioj la rifuĝintorajtoj. Aparta klaso inter la nomadoj estas la ciganoj, kiuj reprezentas internacian komunumon kun ĉirkaŭ ses milionoj da personoj. Antaŭ ĉirkaŭ mil jaroj ili eliris el Hindujo kaj Pakistano renkonte al Okcidento, atingante praktike ĉiujneŭropajn ŝtatojn.

ĈU ĈIUJ DUMSEMAJNAJ DEVIGAJ festoj de la eklezio estos transdonitaj al dimanĉo? De kelka tempo oni diroj pri ĉi tiu "revolucio" cirkuladas en la gazetaro okazigante eĉ polemikajn interpretadojn. Pridemandite, la direktoro de la presagentejo de la S. Seĝo, Alessandrini, deklaris, ke laŭ la normoj de la nuntempa eklezia leĝo, apartenas al la episkopaj konferencoj la alidatiĝo de kelkaj devigaj festoj, precipe en tiuj nacioj, kie ili ne estas agnoskitaj de la civilaj leĝoj.

LA DOMINIKANA ORDENO nombras ĉirkaŭ 9.000 fratojn laborantajn tra la tuta mondo en 40 "provincoj", krom en 45 provincaj kaj 2 ĝeneralaj vikariejoj. La klaŭzuraj monakinoj (dua ordeno) estas pli ol ses mil, kaj la fratinoj laŭ aktiva vivo (tria ordeno) 50.000. Terciaroj kaj terciarinoj preskaŭ 100.000. Membroj de la Rozaria frataro ĉirkaŭ tri milionoj. La sepjarcenta regulo de s. Dominiko, kiu estis taksata unu el la plej celrespondaj inter la samspecaj reguloj, laŭ la ĝeneralaj direktivoj de la Sankta Sidejo rilatantaj ĉiujn ekleziajn organizojn, estis nuntempigita. Impo~~na~~ laboro, ĉar ĉiuj religiuloj en ĉiuj provincoj estis vokitaj doni sian kontribuadon. Tiel la konstitucioj estas frukto de ĉies demokrata kunlaboro. Kaj, laŭ

la deklaro de la ĝenerala patro Aniceto Fernandez, ili "ne nur ne malpliigis la esencan karakteron de la ordeno, sed evidentigis pli precize ĝian specifan celon."

ĈIJARE LA "FILINOJ de Maria-Helpantino" celebras sian unuan jarcentan datrevenon. La instituto estis starigita fakte en la 1872a de S. Johano Bosco, fondinto de la Salesanoj. (Hodiaŭ 22.000 membroj). La sanktulo, kiu jam mirigis la mondon per sia tre efika agado favore al la junuloj, decidis sin okupi ankaŭ pri la knabinoj, kiam li renkontiĝis kun Maria Mazzarello, juna analfabeta kamparanino, sed tre inteligenta, laborema kaj oferema. Ŝi jam okupiĝis pri junulinoj, savante ilin de moralaj danĝeroj, helpante ilin pri laboro kaj preĝado. Sed la renkontiĝo kun S. Johano Bosco malfermis al ŝi vastajn horizontojn. La 5an de aŭgusto 1872a ŝi kun kelkaj aliaj knabinoj ricevis de la fondinto la religiĝan veston kaj faris siajn votojn. Ilia nombro rapide kreskis, spite de ĉiuspecaj malfacilaĵoj. Ili povis malfermi domojn en Italujo kaj dum la postaj jaroj en aliaj nacioj kaj kontinentoj. Hodiaŭ la religiulinoj estas 18.600 el 63 nacioj, kun 1450 domoj. La centra sidejo, kie okaze de la festo de la Patrineco de Maria, malfermiĝis la celebros de la centjara datreveno de la instituto, post diversaj transloĝadoj, nun estas en Romo.

PRI ONIDIROJ DE PROKSIMA koncistoro por kreo de novaj kardinaloj, opinioj kiuj kelkfoje estas disvastigitaj per kelkaj informoficejoj, prof. Alessandri ni, proparolanto de la Sankta Sidejo ĉe Vatikana konferenco, deklaris, ke absolute nenio ĝis nun rezultas. La kardinaloj estas nun 119; el kiuj 92 malpli ol 80-jaraj, do kapablaj eniri Konklavon. La las-

ta serio de kardinalaj elektoj okazis antaŭ tri jaroj en la koncistoro de la 30a de aprilo 1969a. Antaŭe la papo elektis kardinalojn en la 1965a kaj 1967a.

EN QUAGADOUGU, ĈEFURBO de Voltalando, la okan de januaro estis metita la unua ŝtono de leprulejo, iniciate de la fidelularo de malgranda itala diocezo, Civita Castellana. Mons. Roberto Massimiliani, episkopo de tiu urbo celebris solene la riton. Temas ne pri ĝemeliĝo de urboj kun interŝanĝo de turismo kaj de komerco, sed de la plej pura evangelia agado, kiu donacas malavare por Kristo. Kaj notinde estas, ke la plej grava kontribuaĵo venas el la junularo, kiu siamaniere kontestas sociajn majustaĵojn, ne detruante aŭ nur malaprobante, sed plibonigante kaj konstruante. Oni volis, ke tiu ŝtono estu benita de la papo, kaj tio okazis fine de decembro en la Vatikana baziliko, kun ĉeesto de sep mil pilgrimantoj de la oferanta diocezo.

OKAZE DE KOLEKTO DE FONDUSOJ favore al malriĉuloj de subevoluintaj landoj, kio en Usono intensiĝas dum la karesmo, la papo sendis mesaĝon al la usona episkoparo. Interalie li deklaras: "Hodiaŭ la homaro estas priserĉanta novan mondon: novan, ne por ke tiu pleniĝu de la superflua riĉaĵo, kiun la teknologia kaj industria progreso povas liveri, sed ĉar ĝi celas, ke malsatuloj ricevu panon, senhejmuloj domon, malkleruloj instruadon; oni klopodas estigi novan mondon, kie ĉiu kapablu vivi laŭ pli inda homa ekzisto. Ĉi tiu estos mondo de justeco kaj de amo, en kiu tiu, kiu pli ricevis, transdonos helpon al tiu, kiu ricevis malpli. Por Kristanoj, kiuj ricevis la donacon de eterna vivo, jen oportuneco, aliajn helpante, esprimi dankemon al Dio pro la ricevita netaksebla graco de la savo".

"MIA DIOCEZO DE CAJAMARCA en Peruo, klarigis

mons. Dammert Bellido, 54-jara, diplomita pri juro en la universitato de Pavio (Italujo), etendiĝas laŭ 15.000 kv.km. kaj havas altojn de 300 ĝis 4.000 metroj; sed ĝi estas prizorgata de nur tridek sacerdotoj. Meznombre ĉiu el ili devas religie asisti al pli ol 20.000 animoj. Cetere tiu situacio respegulas tiun de la tuta Peruo, lando kvar foje pli granda ol Italujo, kun 13 milionoj da loĝantoj, 2400 pastroj, el kiuj du trionoj estas religiuloj kaj grandparte eksterlandanoj. Dum ĉi tiuj lastaj tridek jaroj la loĝantaro preskaŭ duobliĝis, dum la sacerdotoj pliiĝis nur laŭ 38 kaj la religiulinoj laŭ 53 procentoj. Al la malabundo de la religia asistado aldoniĝas la distancoj inter vilaĝoj, analfabetismo kaj granda religia ignorado. La unuaj misiistoj en nia lando, klarigas la episkopo, estis sendube mirindaj apostoloj, sed ili pasis daŭre de unu vilaĝo al alia, tiel ke mankis vera katekumenado. Hodiaŭ ni estas popolo da baptitoj, sed sen matura, travivata, profunda kredo. Laŭ la episkopo oni devos reveni al katekumenado, celante tamen la tutecan progreson de l' homo, tiel ke kun la religia instruado oni donu praktikajn lecionojn pri agrara tekniko, pri malsanoj de la dombestoj, pri starigo de kamparaj kooperativoj. Li agnoskis, ke la nacilingva liturgia estis tre utila al la kredantoj; sed la simplaj tradukoj estas tro malproksimaj de la popola esprimmaniero. Oni devos klopodi por adapti la formulojn al la komprenpovo de tiuj kamparanoj. Laŭ li, ordinado de edziĝintaj personoj, kun la konsento de la papo estos bona solvo por kreskigi la nombron de pastroj. La instruistoj ekzemple, pensiiĝas inter 50 kaj 55 jaroj. Ili havas jam kulturon, domon, pensionon kaj estas estimataj. Se kelkaj el ili povas ricevi adaptan formadon, kial ne ordini ilin? Pri la revolucia politiko Mons. Dammert deklaras, ke li povas admiri la sin

cerecon de tiuj pastroj, kiuj fariĝis gerilistoj, kvan-
kam li decide malaprobas ilin: "la nura politikode sa-
cerdoto - li diris - devas esti la denunco de maljuste-
coj -". La perua eklezio ne kontentiĝis pri tio; ĉar
antaŭ ĉiuj intervenoj de la registaro pri agrara re-
formo, kaj pri instruado, la eklezio disdonis siajn bi-
enojn al malriĉuloj kaj malfermis lernejon al ĉiuj soci-
klasoj.

LA KVARDEKA INTERNACIA eŭkaristia kongreso es-
tos celebrata komence de la 1973a jaro en Melburno.
(Aŭstrali)o. Al la komisiitoj de la komitato por la pre-
paro de tiu kongreso, kiuj vizitis la papon la 1an de
marto, la papo direktis fervoran alvokon, kiun li in-
tencis disvastigi al la tuta eklezio. "En ĉi tiu aparta
momento de la historio - diris la papo - en kiu ju pli
forta estas en la homa familio la sopiro al unueco, kaj
des pli gravaj la atakoj kontraŭ ĝi, necesas solene
proklami la signifon de la eŭkaristio, kiel signon de
unueco. La eŭkaristio - daŭrigis la papo - konsisti-
gas la eklezion: sidiĝi ĉe la sama tablo por sin nutri
per la korpo de Kristo, estigas en la kristanoj, la plej
intiman kaj ne disigeblan unuecon, fonton de sindedi-
ĉo al Dio kaj al la fratoj per amo. Tio plene montri-
ĝis ekde la komenco de la eklezio, ĉiufoje kiam hierar-
kio, sacerdotoj kaj fideluloj kuniĝis kun la proksimaj
kaj la malproksimaj fratoj, partoprenante en la unika
ofero de la unika korpo de Kristo. La eŭkaristia kong-
reso, alvokante la popolamason antaŭ la tre sankta sa-
kramento, estas tre efika simbolo de la eklezia inter-
na kaj ekstera unueco: estas Kristo solene kaj pub-
like adorata, kiu alvokas al si la tutan eklezion, alla
fonto de ĝia vivo". Antaŭ kelkaj nuntempaj teoriaj aŭ
praktikaj devojiĝoj, tute ne pravigeblaj, - aldonis la
papo - la eŭkaristia kongreso devas lumigi ĉi tiujn ve-

rojn: Kristo estas kun ni ĝis la fino de la mondo, spirite en la malgravuloj kaj malriĉuloj, en la revelaciita vorto, en la liturgia kulto, sed ĉefe, ĉar ankaŭ per sia vivanta korpo, en la tre sankta sakramento. Ties senkomparan gravecon ni agnoskas ankaŭ per la kulto ekster la meso, tio estas per la adorado, dank esprimas, propeto kaj petpreĝo. Tiu kulto subtenas la asketan kaj mistikan vivon en la eklezio, estas nutraĵo kaj forto de apostolado, bazo de ekleziaj vokiĝoj kaj de la sacerdota vivo; centro de unueco en religiaj komunumoj, parokoj, en la tuta eklezio, kaj eĉ en la tuta homaro per la karitato kaj socieco, kiujn ĝi inspiras".

DU REPRESENTANTOJ de la katolika eklezio estis ĵus elektitaj en Britujo kiel plenrajtaj membroj en la komitato zorganta por la "Niew English Bible" (nova angla biblio), la konata angla traduko de la Sankta Skribo, iniciatinta de la protestantoj antaŭ dudek jaroj. Ĝi estas mons. Butler, helpepiskopo de Westminster kaj p. Foley de la "Saint Peter's College" en Skotlando. La unua reprezentos en la biblia komitato la katolikajn eklezion, kaj la dua la skotan. Ambaŭ partoprenos en la tradukoj de la bibliaj tekstoj, kiel konsultantoj kaj observantoj.

ĈIUJ ANGLAJ PARLAMENTANOJ, membroj de la Lorda Ĉambro, ricevis en ĉi tiuj tagoj enketon, kiu invitis ilin deklari sian sintenon rilate al ses moralaj kaj sociaj problemoj: 1) religia instruado en la ŝtataj lernejoj; 2) konfesiaj radio kaj televido; 3) libera divorco; 4) disdono de kontraŭkoncipiloj al la knabinoj de la duagrada lernejoj; 5) eŭtanazio; 6) libera aborto. Al ĉiu parlamentano estas demandite, ĉu li estas favora aŭ ne al la enkonduko de ĉi tiuj normoj aŭ insti-

tucioj, aŭ al ilia abolicio (kiel en la kazo de la religia instruado kaj de sendependaj radio kaj televido, jam aprobitaj kaj protektitaj de la aktuala leĝaro). La iniciato de ĉi tiu originala prisonado inter parlamentanoj venis el la "Ordeno de la kristana unueco", kiu havas preskaŭ 500 membrojn apartenantajn al dekduo da diversaj religioj, inter kiuj la anglikana, la katolika kaj la metodista. La ordeno estis fondita antaŭ 15 jaroj de metodista inĝeniero, kiu hodiaŭ estas ĝia honora prezidanto, kaj kvankam pli ol okdekjara, li estas ankoraŭ tre aktiva. Efektiva prezidanto estas la katolika lady Lothian. La transdono de la demandaro estis decidita post enketo inter la ordenanoj, kiu estigis la plej gravajn maltrankvilajn zorgojn pro la morala kampo. Fakte sennombraj movadoj pli aŭ pli malkaŝe ŝajnas insiste premi por detruo de ĉiu moraleco.

LA PROTOKOLO FARITA INTER la hungara registaro kaj la Sankta Sidejo donis aliajn novajn fruktojn. La 25-an de februaro oni anoncis, ke la papo elektis du apostolajn administrantojn por la diocezoj de Szombathely kaj de Veszprém, kies respektivaj episkopoj demisiis pro atingita aĝlimo, kaj du helpoepiskopojn. El tio oni povas konstati, ke restas ankoraŭ problemoj, kiuj postulos intertraktadojn, ĉar la apostolaj administrantoj ne estas plene respondaj de siaj diocezoj kiel la efektivaj episkopoj. Tamen estas jam antaŭen-paŝo kompare kun la iama situacio, kio rajtigas esperon de iompostioma plena interkonsento.

ABONKOTIZO: It.£.:1.000 (Us.dol. 1,60)

Poŝtgirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari

aŭ pĝk al: 1-37638 - P.Giacinto Jacobitti